La bildlibro
de la historio
FLEURUS









NOVE
PEACE

La bildlibro de la historio

Ideo:
Émilie Beaumont

Teksto:
Marie-Renée Pimont (franca originalo)
Jesper Lykke Jacobsen (esperanta traduko)

Bildoj:
Isabella Misso
Sophie Toussaint
Isabelle Rognoni

GROUPE FLEURUS, 15-27, rue Moussorgski, 75018 PARIS
www.editionsfleurus.com



LA PRAHISTORIO

LA PRAHISTORIA EPOKO

La unuaj homoj vivis per ĉasado, per fiŝkaptado kaj per kolektado. Se mankis nutraĵo ili foriris al alia regiono.



Post la ĉasado la homoj reiras al sia kampadejo.
La tendoj estas faritaj el branĉoj, kovritaj per bestofeloj.



La viro fiŝkaptas per longa lanco kun tajlita pinto.

La lancoj de la ĉasistoj de boacoj estas ekipitaj per silika pinto.

La prahistoriaj homoj kuniĝis foje en grotoj. Poste ili konstruis vilaĝojn, kultivis kampojn kaj bredis bestojn.

Ĉi tiuj artistoj ekloĝis sur la fundo de groto. Ili prilumas ĝin per torĉo por povi gravuri kaj pentri desegnaĵojn sur la muroj. Ili bildigas la bestojn, kiujn ili ĉasas: ĉevalojn, bizonojn, virbovojn...



Tiuj ĉi viroj volas konkeri la vilaĝon. Ili ekbruligas la sagojn antaŭ pafi ilin sur la pajlajn tegmentojn de la lignaj domoj.

LA INVENTO DE LA SKRIBADO

La homoj gravuris signojn sur argilo aŭ ŝtono por komuniki inter si: estiĝis la skribado. Tio estis la fino de la prahistorio.



Komercisto prenas bulon da argilo kaj junkon. Li scipovas gravuri kapon de virbovo, kapon de azeno, spikon de hordeo. Apude li desegnas bastonojn aŭ rondojn por indiki la kvanton. Tiel li memoras pri siaj aĉetoj kaj vendoj.



Ĉu vi volas skribi signojn kiel niaj foraj prapatroj? Faru patkukon el modlopasto. Per bastoneto gravuru ĉi tiujn desegnaĵojn, kiuj signifas: virbovan kapon, ses grenkampojn, virinon kun infano. Inventu aliajn desegnaĵojn.



LA ANTIKVECO

EN LA ANTIKVA EGIPTIO

La faraono estis la reĝo de Egiptio. Lia lando estis riĉa dank' al la laboro de la kamparanoj kaj al la minoj de oro kaj gemoj.



Ĉiu egipto, kiu sin prezentas antaŭ la faraono, ĵetas sin sur la genuojn antaŭ li. La kamparanoj devas doni al li parton de sia rikolto.



La faraono paradas sur militĉaro por montri, ke li posedas potencan armeon, ofte en konflikto kun la najbaraj landoj.

TEMPLOJ KAJ PIRAMIDOJ

La egiptoj adoris sian faraonon kiel dion. Post lia morto ili metis lian kadavron en la centron de alta piramido.



Dum festoj la statuoj de la dioj estas portataj en procesio. La egiptoj alportas oferojn. Ili pridemandas la diojn por scii la estontecon. Se la statuo klinas sin antaŭen, la respondo estas jes. Se ĝi klinas sin malantaŭen, la respondo estas ne.



Miloj da laboristoj konstruas la piramidojn: tajlistoj de ŝtonoj, skulptistoj... La konstrulaboro daŭras kelkfoje pli ol tridek jarojn!

MUMIOJ

La egiptoj transformis la korpojn de mortintoj en mumiojn. Ili ĉirkaŭis la kadavron per bendetoj antaŭ porti ĝin en la tombon.

La preĝisto, kiu superrigardas la enbalzamigon, surhavas maskon de dio kun ŝakalkapo. Ornamaĵoj estas enŝovitaj inter la bendetojn.



En la temploj kaj la tomboj oni trovis multajn mumiojn de bestoj. La egiptoj kredis, ke la bestoj akompanas siajn mastrojn post la morto.

TUTANKAMON, LA INFANA FARAONO

Tutankamon mortis juna. 3200 jarojn poste esploristoj retrovis lian tombon, ankoraŭ plenan je mebloj kaj multvaloraj ornamaĵoj.



Tutankamon fariĝas la faraono de Egiptio kiam li havas naŭ jarojn. La popolo lin konsideras sia dio. Konsilistoj helpas lin regi. Li portas la simbolojn de la povo de la egiptaj reĝoj: la koleran kobron, la sceptron kaj la vipon.



Post lia morto, la mumio de Tutankamon estas metita en eningitajn ĉerkojn, kiujn mem enhavas granda ŝtona kofro: la sarkofago. La kapo estas kovrita de belega masko el oro kaj gemoj.

EN EGIPTA DOMO

Jen la domo de riĉa egipto. Por konservi ĝin malvarmeta la domo estis blanka kaj ĝiaj fenestroj tute malgrandaj.



Post dormado sur la malvarmeta teraso, la infanoj ludas pilkon. Servisto kuiras ekstere, kaj alia zorgas pri la bestoj.

La mastroj servigis al si anserorostaĵon, kukojn kaj fruktojn. Ili admiris la virinojn, kiuj dancis je la muziko de liuto kaj tamburinoj.

La ludoj de la egiptaj infanoj similas al la hodiaŭaj, sed la turboj, la peonoj kaj eĉ la pupo estas ceramikaĵoj.

LA VIVO ĈE LA BORDO DE NILO

La egiptoj vivis en vilaĝoj konstruitaj laŭlonge de Nilo, unu el la plej longaj riveregoj en la mondo. La resto de la lando estis dezerta.

La egiptoj havas nek monerojn, nek monbiletojn. Ili do interŝanĝas siajn varojn, ekzemple kukon kontraŭ ludilo.

Ĉiun printempon la akvo transbordiĝas el la riverujo: okazas inundo. Kiam la akvo forsekiĝas la tero fariĝis riĉa kaj fekunda.

La greno estas tranĉita kaj stokita sekure en la grenejoj.
La azenoj transportas korbojn plenajn je melonoj aŭ kukumoj.

EN LA LERNEJO DE LA SKRIBISTOJ

Nur la princidoj kaj la skribistoj lernis legi kaj skribi hieroglifojn. Tiu vorto signifas “sankta skribo”.



Ĉiu paletro enhavas ruĝan kaj nigran inkojn, penikojn, gratilon kaj glatigilon. La lernantoj skribas sur tabuletoj el kalko kovritajn per gipso. La plej lertaj rajtas uzi iuspecan paperon faritan el la fibroj de planto: papiruso.



1. La tigoj de papiruso estas tranĉitaj.
2. La ŝelo estas formetita.
3. La interno estas tranĉita en bendetojn.
4. La bendetoj estas supermetitaj.
5. Ili estas kovritaj per ŝtofo kaj frapitaj ĝis ili formas unu folion.

EN ANTIKVA ĈINIO

La unuaj ĉinoj pensis, ke ilia lando situas meze de la universo kaj ke ilia imperiestro estis gvidata de la potenco de la ĉielo.



Fremda vizitanto sin klinas antaŭ la imperiestro kaj rigardas la teron.

La ĉinoj uzas manĝbastonetojn por manĝi rizon.



Tiu ĉi familio loĝas en ŝipo kaj navigas sur la kanaloj.

La kuracisto pikas la haŭton per fajnaj pingletoj: estas akupunkturo.

LA UNUA IMPERIESTRO DE ĈINIO

Li estis potenca kaj kruela! Li konstruigis luksajn palacojn. En unu el ili la manĝosalono longis unu kilometron.



La imperiestro konstruigis la Grandan Muron de Ĉinio por haltigi la invadantojn. La ĉinoj diras, ke ĉiu ŝtono kostis la vivon de viro! Ĝi tiom longas kaj altas, ke laŭdire oni povas ĝin videti de la Luno.



Apud lia tombo oni trovis preskaŭ 7000 statuojn de soldatoj. En tiu tempo oni kredis, ke ili protektas la imperiestron en la transmorta mondo. Ĉiu statuo malsamas. Ili estis pentritaj, sed hodiaŭ la koloroj malaperis.

LA ĈINAJ TRADICIOJ

La skribmaniero inventita en la antikva Ĉinio ankoraŭ samas hodiaŭ. Kaj la ĉinoj daŭre bredas silkajn raŭpojn.



Eksterlandaj komercistoj venas en Ĉinion el foraj landoj por aĉeti, per oro aŭ gemoj, mirindan ŝtofon nomitan silko, kies elfarmaniero estis ĉina sekreto. La silko estas teksita el la fadenoj de la kokono, per kiu la silkaj raŭpoj sin ĉirkaŭigas por fariĝi papilioj.

Certaj ĉinoj lernas la arton bele skribi: la kaligrafion. Per bastonetoj, penikoj kaj tuĉo ili kopiadas kelkajn el la miloj da signoj nomitaj “ideogramoj” (vorterosignoj).

GREKA URBO

La grekoj loĝas en montoriĉa lando ĉirkaŭita de la maro.
En la urboj loĝis liberaj homoj, iliaj familioj kaj sklavoj:
homoj, kiujn oni povis aĉeti aŭ vendi.

Ĉiu butiko en la bazaro estas prizorgata de familio kaj ties sklavoj.
Tiu ĉi damo elektas bele dekoritan vazon.



La liberaj homoj sin nomas “civitanoj”. Ili kuniĝas sur la granda placo,
la “agoro”, por diskuti tekstojn pri novaj leĝoj.

La atenanoj ofte iris sur la monteton de la Akropolo, kiu superstaras la urbon kaj sur kiu multaj temploj estis konstruitaj. Ili alportis oferojn al la diino Atena, la protektantino de la urbo.



La plej granda templo nomiĝas Partenono. Sur la altaro de la diino Atena, la grekoj oferas kaprinojn kaj bovinojn.



La grekoj organizas teatrajn konkursojn. Sidante sur la ŝtupoj, ili aŭskultas la aktorojn, kies vizaĝoj estas kaŝitaj per maskoj.

EN GREKA DOMO

En riĉaj familioj, la virinoj kaj la knabinoj loĝis en la unua etaĝo de la domo, kaj la viroj kaj la knaboj en la teretaĝo.

La knabinetoj lernas ŝpini kaj teksi lanon.

La knaboj surhavas mallongan tunikon, ĉirkaŭitan de zono.

La familio faras oferojn al la dioj sur la altaro de la domo.

La infanoj ne uzas sapon. Ili sin frotas per oleo.

La murojn ornamis pentritaj motivoj nomataj “freskoj”. La meblaro estis simpla. Por manĝi oni kuŝis komforte sur divanoj.



La plej riĉaj grekoj organizas festajn manĝojn nomatajn “bankedoj”. La nuraj virinoj, kiuj ĉeestas, estas dancistinoj aŭ muzikistinoj.



Por eliri, la grekoj surhavas mantelon super la longa tuniko.



La grekoj paŝas nudpiede, aŭ surhavas simplajn sandalojn.

LA LERNANTOJ

La knabinoj restis hejme. Nur filoj de riĉuloj iris al la lernejo. Ili tie lernis ankaŭ pri sporto, muziko kaj poezio.

La sklavo, kiu akompanas la infanon al la lernejo, nomiĝas pedagogo.



La junaj grekoj lernas legi, skribi kaj ludi liron.



Filo de potisto faros la metion de sia patro. Li neniam iros al lernejo.



En la gimnastejo la pli grandaj infanoj trejnas sin lukti kaj salti.

GREKAJ DIOJ KAJ HEROOJ

La grekoj kredis je la ekzisto de multnombraj dioj.
Ili organizis festojn por ili dum procesioj kaj sportaj konkursoj



Jen Zeŭso, la reĝo de la dioj, la diino de saĝeco Atena, la dio de la maro Pozidono, kaj Apolono, la dio de la lumo kaj la artoj.



Heraklo estas kuraĝa heroo.
Li eĉ dresis furiozan leonon.

Ligita al sia masto, Odiseo rezistas la alvokojn de strangaj kreitaĵoj.

LA LABIRINTO DE MINOTAŬRO

Oni rakontas, ke Minoo, la reĝo de Kreto, tenadis enfermata en la mezo de labirinto Minotaŭron, estaĵon duone homon kaj duone virbovon.



Ĉiun jaron la atenanoj devas fordoni dek kvar grekajn gejunulojn al Minotaŭro, kiu ilin voras. Ĉi-foje Tezeo ilin akompanas.



La reĝidino Ariadno donas al Tezeo fadenon, kiun li malvolvas en la labirinto por ne perdiĝi. Li mortigas Minotaŭron kaj eliras laŭ la fadeno.

LA GREKAJ MARISTOJ

La grekoj estis bonaj maristoj. Ili navigis tre longe for por trovi varojn. Militŝipoj ilin protektis kontraŭ piratoj.

Tiu ĉi militŝipo antaŭeniras dank' al siaj veloj kaj al siaj multaj remistoj. Viro sur la supra ferdeko donas la ritmon.



Interŝanĝe por potoj kaj ornamaĵoj la grekaj maristoj akiras vinon kaj oleon, kiujn ili reportas en grandaj argilaj potoj nomataj amforoj. Ĉe la alveno de la ŝipoj, la komercistoj sin instalas en la haveno, proksime de la montrotabloj de la fiŝkaptistoj.

LA OLIMPIAJ LUDOJ

Ĉiun kvaran jaron okazis sportkonkurso en la urbo Olimpio, honore al la dioj. Tiam la militoj inter urboj haltis.



La atletoj petas la protekton de Zeŭso kaj defilas antaŭ lia altaro.



La kurantoj rondiras la stadionon, dum la spektantoj aklamas.

Vetkuro kun armiloj estas unu el la multnombraj konkursoj de la Ludoj, kiuj donas gloron al la venkinto.

La atleto uzas pezaĵojn por helpi konservi sian ekvilibron dum la longosaltado.



Ĉiu luktanto provas faligi sian kontraŭulon sur la grundon kaj senmovigi lin.



La juĝisto solene donas olivan kronon al la venkinto.

GAŬLA VILAĜO

Antaŭe Francio nomiĝis Gaŭlio. La gaŭloj konstruis domojn el ligno kaj mortero, farita el pajlo kaj argilo.

EN GAŬLA DOMO

La domo nur enhavis unu ĉambron. La gaŭloj dormis sur bestohaŭtoj sternitaj rekte sur la tero, aŭ sur benketoj.

La panjo teksas kovrilon el lano, dum la infanoj ludas ostetojn aŭ pupon. La manĝo kuiriĝas en la kaldrono.



Tiu ĉi bebo estis vindita kaj poste kuŝigita en lignan lulilon.

Ne ekzistas fridujoj! Oni peklas la viandon por povi ĝin konservi.

LABORI EN LA VILAĜO

Jarfine la druido tranĉis la viskon per serpo. Eĉ nuntempe, por la Novjaro, oni interkisas sub bulo da visko.

La druido estas la preĝisto kaj ankaŭ la kuracisto de la vilaĝo.



La kamparano alligas virbovojn al la plugilo por plugi sian kampon.



La ligno utilas por hejtado, meblofarado kaj eĉ ŝildoj!

La ĉasisto revenas kun ĉasaĵo. Foje li postĉasas vagantan lupon.

GAŬLAJ FESTOJ

La gaŭloj ofte organizas festenojn. Ili sin regalas, manĝante apron kaj trinkante vinon aŭ iuspecan bieron sen lupolo.

La bardo ludas liron por akompani siajn poemojn kaj kantojn.
La gaŭloj ŝatas liajn historiojn pri milito aŭ pri ĉasado.



La gaŭloj estas elstaraj ĉevalistoj. Ili sin trejnas ekde infanaĝo.
Kiam ili estas plenkreskaj, ili defias unu la alian en ĉaraj vetkuroj.

VERCINGETORIKS, KURAĜA MILITESTRO

Vercingetoriks batalis kontraŭ la romiaj invadantoj, sed li perdis. Poste Gaŭlio fariĝis romia provinco.

Por sin protekti la gaŭlaj batalantoj surhavas maŝkirason, kaskon kaj grandan ovalan ŝildon el ligno. La glavo estas fiksita al la dekstra kokso. Ili svingas longan feran lancon. Kelkaj batalas de sur ĉevalo.



Post la batalo ĉe Alezio, Vercingetoriks ĵetas siajn armilojn ĉe la piedojn de la romiano Julio Cezaro por agnoski sian malvenkon. Por montri sian venkon al ĉiuj, Cezaro rondiras Gaŭlion kun sia militkaptito. Poste li kunportas lin al Romo kaj enfermas lin en karcero dum ses jaroj.

ROMIA URBO

La romianoj konkeris grandegan teritorion. Nuntempe Romo ne plu estas la ĉefurbo de imperio, sed de lando nomata Italio.

Estas bazara tago. Sklavoj estas katenitaj sur podio, kiu situas inter la vendotabloj. Oni vendas ilin aŭkcie.

Se la sklavoj montriĝis fidelaj kaj laboremaj,
iliaj mastroj konsentis reliberigi ilin post kelkaj jaroj.

La romianoj ofte iras al la publika banejo. Tie ili ĝuas banadon en malvarma kaj varmeta akvo, aŭ vaporbanojn.



Post venko la romianoj konstruas triumfarkon.



La civitanoj diskutas pri la urbo sur granda placo, la forumo.

BELA ROMIA DOMO

La riĉegaj romianoj posedis belajn domojn en la urbo kaj vilaojn en la kamparo. Sed la plimulto loĝis en apartamentoj.

Unu fasado rigardas al la strato. Bakisto ekloĝis tie. La eksteraj muroj ne havas fenestrojn, por ke la ŝtelistoj ne povu eniri.

Dum la festenoj, inter la antaŭmanĝo kaj la deserto, estis proponataj al la invititoj ĝis sep malsamaj pladoj!

La juna virino sin ŝminkas kaj parfumas. Ŝi surhavas kolieron el oro kaj beletajn orelringojn.

La viroj surhavas mallongajn tunikojn, kovritajn per togo, kaj la virinoj longajn tunikojn kaj ŝalojn.



La riĉaj romianoj manĝas kuŝante sur divano. Sklavoj servas al ili.

Junulino kantas kaj akompanas sin per liro.

LA LUDOJ EN LA ARENO

Koloseo estas grandega amfiteatro. Tie okazis spektakloj organizitaj de la imperiestro aŭ de riĉegaj romianoj.



Sidante sur ŝtonaj laŭŝtupaj seĝovicoj, la romianoj pasie spektas la spektaklojn kun bestoj el foraj landoj. Foje la bestoj estis lasitaj sen manĝaĵo dum pluraj tagoj, kaj ili batalas ĝis la morto en la areno.



Krimuloj aŭ homoj, kiuj aŭdacis kontraŭstari la imperiestron, estas kelkfoje ĵetataj al malsategigitaj leonoj, dum rigardas la spektantoj. Foje kristanoj, kiuj ne plu volas kredi je la romiaj dioj, estas kondamnataj al turmento.

Homamasoj venis por vidi la gladiatorojn interbatali.
La romianoj pasiiĝas ankaŭ pri vetkuro de ĉaroj.

La ĉarstiristo kondukas etan duradan ĉaron, kiun tiras rapidaj ĉevaloj. Li rondiras la kurejon sepfoje.





La gladiatoroj ofte estas militkaptitoj. Kiam la imperiestro levas sian dikfingron, tio signifas ke la perdinto rajtas pluvivi.

EN LA LERNEJO

Geknaboj de riĉaj familioj iris al la lernejo ĝis ili havis ĉirkaŭ dek du jarojn. Poste la knaboj plustudas kun guvernisto.

Infano kalkulas per abako. Alia gravuras literojn sur tabuleto el vakso. Ankoraŭ aliaj legas rulaĵon el pergameno.

Tiu ĉi ludo, kiu pasiigas la knabojn, estas praa damludo.



Tiuj ĉi infanoj ludas rulringon, ĵetkubojn kaj ostetojn.

LA ROMIA ARMEO

La soldatoj militservis dum dudek jaroj. Ili gajnis multajn batalojn, kaj la romia imperio fariĝis vastega.



La legiano sin protektas per kasko, kiraso kaj ŝildo.

La militŝipoj protektas la marbordon de la tuta imperio.



La katapulto ĵetegas pezajn ŝtonojn en la malamikan kampon.



La soldatoj estas ŝirmitaj de ĉiuj flankoj: ili formas testudon!

MOZAIKA FIŜO

Amuziĝu farante dekoran mozaikon, samkiel faris la romianoj.



Havigu al vi modlopaston de malsamaj koloroj.

Plasta tranĉilo

Kartono 21 x 29,7 cm



Rulsternu la modlopaston por havi ebenan tavolon de 5-milimetra dikeco.



Helpata de plenkreskulo, eltranĉu kvadratojn 1 x 1-centimetrajn per tranĉilo.



Same faru por la aliaj koloroj.

Por fari la okulon, gluu etan bluan punkton al blanka kvadrato.

Sur la kartono desegnu kvadrataron el 1 x 1-centimetraj kvadratoj. Numeru la kvadratojn sur la flankoj. Loku kaj algluu la malsamajn koloritajn pastokvadratojn rigardante ĉi tiun modelon kaj la ciferojn.
Ekzemple: oranĝa koloro je linio 1 - kolono 1.
Fortondu la kartonon superfluan ĉe la randoj kaj lasu sekiĝi.



LA HEBREA POPOLO

La historio de tiu “popolo de dio” estas rakontita en la Biblio. Ili estis la unuaj, kiuj kredas je nur unu dio.



La prapatro de la hebreoj, Abrahamo, aŭdas la voĉon de Dio, kiu postulas, ke li foriru kun sia tribo. Li marŝadas ĝis Palestino. Pelataj de malsatego, la hebreoj poste foriras al Egiptio. Tie ili vivas feliĉe, ĝis ilin malbone traktas iu faraono.

Moseo aŭdas la voĉon de Dio, kiu ordonas al li konduki la hebrean popolon ekster Egiption. Kiam ili kampadas apud la maro, la postsekvantaj egiptoj ilin atingas. Moseo levas sian bastonon, la akvo disfendiĝas, kaj la hebreoj pasas kun sekaj piedoj.

Palestino, kie ekloĝis la hebreoj, ofte estis invadata. Multaj foriris eksterlanden. Tie ili daŭre observadis sian religion, la judismon.

Transirinte la dezerton, la hebreoj alvenas en la Promesitan Landon. Ili vivas kiel dek du triboj, ĉiu gvidata de unu estro. Longe poste Davido fariĝas la reĝo de Israelo. Lia filo Salomono konstruigas la templon de Jerusalemo.



En la rakontoj de la Biblio la profetoj antaŭdiras la alvenon de iu Mesio, kiu savos la hebrean popolon. La kristanoj opinias, ke li estas Jesuo, naskita en Betlehemo. En ĉiuj kristanaj landoj, la naskiĝo de Jesuo difinas la 1-an jaron de la Historio.



MEZEPOKO

KLODVIGO, REĜO DE LA FRANKOJ

Post la fino de la romia dominado, Gaŭlio estis okupita de pluraj popoloj. La patro de Klodvigo estis la reĝo de la frankoj.



Klodvigo havas 15 jarojn, kiam lia patro mortas. Li estas elstara militisto. Post kiam li fariĝis reĝo de la frankoj, lia unua granda venko okazas en la batalo ĉe Suasono [*Soissons*], kontraŭ la lasta romia militestro, kiu ankoraŭ estas en Gaŭlio. Post la forpelo de tiu ĉi, Klodvigo regas la tutan nordan parton de Gaŭlio.

Post la batalo, Klodvigo postulas vazon kiel militpredon de iu soldato. Tiu rifuzas kaj disbatas la ujon per sia hakilo. Unu jaron poste Klodvigo rekonas tiun soldaton kaj diras al li, ke liaj armiloj estas malbone prizorgataj. Poste Klodvigo frakasas lian kranion per sia hakilo, deklarante: “Memoru pri la vazo de Suasono!”

Klodvigo decidis, ke nur filoj de la reĝoj de la frankoj povos mem fariĝi reĝoj. La reĝidinoj neniam estu kronitaj reĝinoj.





Klodvigo edziĝas al Klotildo, kiu instigas lin kristaniĝi kaj ne plu kredi je la dioj de la frankoj. Episkopo Remiĝo baptas Klodvigon en Remso.



Klodvigo pligrandigas sian regnon, forpelante la etajn suverenojn.
Li estas enterigita en Parizo, la urbo kiun li elektis kiel ĉefurbon.

LA IMPERIESTRO KAROLO LA GRANDA

Ĉiuj homoj devis ĵuri al Karolo la Granda obeemon kaj fidelecon. Liaj senditoj zorgis, ke la leĝoj estu konataj kaj respektataj.

Karolo la Granda batalas por pligrandigi sian teritorion.

La papo kronas lin imperiestro de la Okcidento en la jaro 800.

Karolo la Granda instalas lernejojn apud siaj palacoj.



Li instigas la monaĥojn skribi kaj ilustri belajn manuskriptojn.

LA VIKINGOJ

La vikingoj estis teruraj militistoj. Ili ofte foriris de siaj nordaj regionoj por ataki kaj prirabi la riĉajn landojn.

La urbon ĉirkaŭas herbejoj kaj kampoj. La tegmentoj de la domoj estas kovritaj per herbotavolo. La plej granda domo estas tiu de la estro.

Por fari militon la vikingoj vojaĝas per malpezaj ŝipoj, nomataj drakŝipoj. Por transporti varojn ili preferas pli grandajn ŝipojn. Ili scipovas navigi laŭ la suno kaj la steloj. Laŭdire ili ŝipveturis ĝis Ameriko!

MEZEPOKA VILAĜO

La kamparanoj loĝis apud la fortikigita kastelo, aŭ burgo. La tero, kiun ili kultivis, apartenis al la senjoro. Ili donis al li parton de la rikolto.



LA UNUAJ BURGOJ

Komence de la mezepoko la senjoroj konstruigis turojn el ligno. Poste ili uzis ŝtonojn por konstrui remparojn kaj ĉefturojn.

La ligna turo estas starigita sur monteto apud rivero. Ĝin ĉirkaŭas alta palisaro el ligno. Fosaĵoj estas faritaj ĉirkaŭe kaj plenigitaj per la akvo de la rivero. Se la malamiko alvenas, la kamparanoj rifuĝas malantaŭ la palisaron.



La kastelo estas pligrandigita. Unua palisaro ŝirmas la korton, kie loĝas la bestoj. La turo, kie loĝas la senjoro kaj lia familio, situas ŝirmite malantaŭ la dua palisaro: estas la ĉefturo. Kaze de atako oni formetas la ŝtupetaron, kiu kondukas al la ĉefturo.

ATAKU LA BURGON!

Trovu tion, kion uzas la enloĝantoj de la burgo por sin defendi: kaldronon da bolanta oleo, arkojn, lancojn, hakilojn.

Trovu tion, kion uzas la atakantoj: atakturon, ŝildojn, brulantajn sagojn, ŝtonojn, ŝtupetarojn.

LA VIVO EN LA KASTELO

La princoj kaj la senjoroj ŝatis ne nur kantojn, dancojn kaj societajn ludojn... sed ankaŭ ĉasadon kaj bonan manĝaĵon!

La virinoj kuniĝas por ŝpini kaj teksi la lanon.

Multnombraj servistoj kuiras viandon kaj legomojn.

Viroj kaj virinoj ludas damludon kaj ŝakon.

La muzikistoj sonigas la ritmon por la rondodanco.

La malriĉaj kamparanoj ne rajtis ĉasi bestojn sur la terenoj de la senjoroj, sub minaco de puno.

Senjoro ĉasas cervon, helpata de sia hundaro. Alia flugigas sian falkon, por ke ĝi revenu kun malgrandaj ĉasaĵoj.

Granda festeno sekvas la ĉasadon. La senjoro manĝas el arĝenta telero. La malpli gravaj invititoj metas sian viandon sur granda pantranĉo kaj poste ĵetas la ostojn teren! Oni uzas tranĉilon, sed forkoj ne ekzistas.

LA MEZEPOKAJ KAVALIROJ

Kiam la kavaliroj ne militadis, ili partoprenis turnirojn, organizatajn en la kasteloj de la senjoroj.



Sub la kiraso la kavaliro surhavas maŝkuton. Helmo protektas lian kapon, kaj fergantoj liajn manojn. Liaj piedoj surhavas ferŝuojn. La korpo kaj la kapo de la ĉevalo ankaŭ estas kirasitaj.



La kavaliro ĵuras: li promesas resti fidela al sia senjoro.

La kavaliroj batalas de sur ĉevalo aŭ korpon kontraŭ korpo.

TURNIRO

La kavaliroj rajdis sur ĉevaloj, dresitaj por milituzo.
La plej riĉaj trejnis ĉevalojn nur por uzo dum turniroj.

Barilo disigas la batalantajn kavalirojn. La venkinto estas tiu, kiu sukcesas ĵeti sian kontraŭulon teren.

La kavaliroj, kiuj perdas la batalon, donas elaĉetpagon al la venkinto: sian kirason aŭ eĉ sian ĉevalon! Kelkfoje tio konsistigas ilian tutan riĉaĵon... La senjoro ankaŭ donas belan premion.

MEZEPOKA URBO

La mezepokaj urboj ofte estis konstruitaj ĉe riverbordo.
Ilin ĉirkaŭis muroj kaj apudaj fosaĵoj.

La enloĝantoj, kiuj posedis belan domon, estis nomataj la “burĝoj”. La malriĉuloj loĝis en mansardoj, sub la tegmentoj.

LA KATEDRALOJ

Katedralo estas preĝejo, kie oficas episkopo. En mezepoko ĉiuj skulptaĵoj estis pentritaj. La koloroj iom post iom forviŝiĝis.



Skulptistoj, ŝtontajlistoj, ĉarpentistoj kaj multaj aliaj laboras dum jaroj por konstrui katedralon. Poste la pilgrimantoj, kiuj venas tien por preĝi, ekvidas ĝiajn spajrojn de pli ol dek kilometrojn for!

Interne de katedralo la lumo estas belega. La sunradioj pasas tra la vitraloj, fenestroj kun buntaj vitroj. La kristanoj lernas la rakontojn de la Biblio, observante la scenojn, kiujn reprezentas la skulptaĵoj kaj la vitraloj.

NIA DAMO DE PARIZO

La parizanoj kelkfoje festis sur la placo antaŭ la katedralo. Sed la skulptaĵoj de sanktuloj kaj anĝeloj gardostaras super la pordego!



La spektantoj aŭskultas la rakonton: la bonuloj iros al Paradizo kaj la malbonuloj pereos en la kaldrono de la Diablo!

VI MEM FARU VITRALON







Sur blanka folio desegnu rozvitralon, kiel sur la modelo. Bone observu ĝin: oni donis al ĉiu cirklo koloron por gvidi vin.

Metu la vitroplaston sur la folio kaj kolorigu la rozvitralon per la peniko, laŭ la kolorita modelo. Kiam la farbo sekas, desegnu per la feltkrajono la strekojn de la cirkelo.





El la alia blanka folio eltranĉu la saman formon kaj gluu ĝin sur la folio de vitroplasto.

Vi povas fari plurajn. Gluu ilin sur la vitro de via fenestro. Tio faras belan efekton kun la suno.

LA KRUCMILITOJ

La papo ordonis al la kristanoj forpeli la muzulmanojn, kiuj malebligis al la pilgrimuloj iri en Palestinon preĝi sur la tombo de Jesuo.

Kavaliroj, kaj poste reĝoj, iras krucmiliti. Oni nomas la soldatojn “kruculoj”, ĉar ili surhavas vestaĵojn kun kruco. La kavaliroj estas armitaj per lanco kaj glavo. Ili batalas kontraŭ la muzulmanoj, kiuj svingas sabrojn kaj ponardojn.

Jerusalamo estas plurfoje konkerita kaj poste perdita.
Multaj aventuruloj aliĝas al la soldatoj por serĉi fortunon.

LUDOVIKO LA 11-A AŬ SANKTA LUDOVIKO

Li ekregis kiam li havis dek unu jarojn, konsilata de sia patrino, la reĝino Blanka. Li tiom bonis, ke li estis sanktigita post sia morto.

Monaĥoj instruas al li legi kaj skribi. Li multe sportumas.



Jen li kun sia reĝino Margareta kaj unu el iliaj dek unu infanoj.

La reĝo sidiĝas sub kverko por aŭskulti la plendojn de siaj subuloj.



Li iras krucmiliti. La muzulmanoj gardas lin du jarojn en prizono.

MARKO POLO

Li naskiĝis en Venecio. Lia patro kaj lia onklo travojaĝis Azion. Tie ili aĉetis multvalorajn varojn, nekonatajn en Eŭropo.

La papo konfidas al li mesaĝojn por la mongola reganto.



Marko havas dek sep jarojn. Li foriras kun sia patro al Ĉinio.

Ĉe la Granda Ĥano li lernas la mongolan lingvon.

Marko priskribas siajn vojaĝojn en la “Libro de mirindaĵoj”.

JOHANINO DE ARKO

De cent jaroj estis milito inter la francoj kaj la angloj.
Tiam juna ŝafistino venis helpi la estontan reĝon de Francio.

Dum ŝi paŝtas la ŝafojn, Johanino aŭdas voĉojn de anĝeloj kaj sanktuloj, kiuj petas ŝin forpeli la anglojn. Ŝi renkontas la reĝidon Karolon, kiu fidas ŝin.

Ŝi savas la urbon Orleano per ruzo. Ŝi kondukas la estontan reĝon al Remso, kie li estas kronita Karolo la 7-a. Sed Johanino poste estos kaptita kaj transdonita al la angloj. Ŝi estos bruligita sur ŝtiparo.



RENESANCO

LA PRESITA LIBRO

Gutenbergo inventis la presadon: li elpensis fari moveblajn literojn el plumbo, kovri ilin per inko kaj presi ilin sur papero.

La laboristo kovras sian kribrilon (a) per paperpasto. Li celas fari belan folion, fajnan kaj ebenan. Post elpremo de la akvo, li lasas la folion sekiĝi. Sur la ligna kadro (b) la tipoj estas vicigitaj kaj kunpremitaj por formi vortojn.

Per la presilo (a) la laboristo premas tre forte la paperfolion kontraŭ la plumbaj tipoj kovritaj per inko (b). La vortoj estas presitaj sur la folio (c).

KRISTOFORO KOLUMBO EN AMERIKO

Je tiu tempo la kleruloj pensis, ke la Tero estis ronda. Kristoforo Kolumbo decidis iri al Hindio... transirante la oceanon Atlantiko.



La gereĝoj de Hispanio donas al li tri ŝipojn: Sankta-Maria, Pinta kaj Ninja. La maristoj esperas trovi oron, sed ili timas, ĉar la vojaĝo daŭras pli longe ol atendite! Kristoforo Kolumbo navigas observante la stelojn.

La 12-an de oktobro 1492 Kristoforo Kolumbo elŝipiĝas sur insulo. La enloĝantoj bone gastigas lin, sed la maristoj seniluziiĝas, ĉar ili ne trovas oron! Kristoforo Kolumbo ne komprenas, ke li ne estas en Hindio! Sed fakte li malkovris novan kontinenton, kiu nomiĝos Ameriko.

LA ESPLORISTOJ

Hispanoj foriris por esplori kaj konkeri Amerikon.
Korteso alvenis en Meksiko kaj Pizarro en Sudameriko.

Vidante Korteson, la aztekoj pensas ke li estas dio. Multaj mortas pro malsanoj. Ili ne rezistas al morbilo kaj al variolo, kiuj estas malsanoj alportitaj de la eŭropanoj. Helpata de certaj enloĝantoj de Meksiko, Korteso atakas grandan aztekan urbon.



La inkaoj vivas en la altaj montaroj de la Kordilero de Andoj. Ili konstruas grandajn urbojn, kiel tiu de Maĉupikĉuo. Ili nomas sian imperiestron “filo de la sundio”. Sed Pizarro mortigas lin. Tio estas la fino de la inkaa imperio.

FRANCISKO LA 1-A, REĜO DE FRANCIO

Francisko la 1-a ŝatas esti ĉirkaŭita de la gravuloj de la regno. Ili konsistigis lian kortegon kaj vojaĝis kun li.

Francisko la 1-a aprezas festojn kaj longajn diskutojn. Li invitas muzikistojn, poetojn kaj scienculojn al sia kortego. Multaj estas italoj kaj alportas novajn ideojn en Francion: estas la Renesanco.

Francisko la 1-a sportemas: li ludas polmoludon (pratenison). Leda pilko resaltas de la rakedoj. La ludantoj estas lokataj ambaŭflanke de la reto.

KONKERANTA REĜO

Francisko la 1-a gajnis multajn batalojn, sed akiris multajn malamikojn, inter aliaj la reĝojn de Hispanio kaj Anglio.



De la komenco de sia reĝado, Francisko la 1-a sukcesas transpasi la Alpojn por kontraŭbatali siajn malamikojn en Italio. Li gajnas la batalon en Marinjano [*Marignan*]. Li petas esti kavalirigita de la plej kuraĝa de siaj kavaliroj, la fama Bajardo.



En la kampadejo de la Ora Drapo, Francisko la 1-a renkontas la reĝon de Anglio. Sed tiu ĉi preferas sin alianci kun la reĝo de Hispanio.

GRANDA ĈASISTO

Eĉ kiam li foriris militi, la reĝo Francisko la 1-a haltis
ĉe la bienoj de siaj amikoj por iri ĉasi kun plezuro!

La reĝo pensas, ke ĉasado estas bona trejnado por la milito.
Li kurĉasas cervojn, lupojn kaj eĉ ursojn.

Francisko la 1-a konstruigas Ĉambordon, kastelon kun 365 fenestroj,
meze de granda arbaro, kie ĉasbestoj abundas.

DE KASTELO AL KASTELO

Princoj kaj dukoj vivis en la kortego de la reĝo tri monatojn ĉiujare. Poste ili rehejmiĝis al siaj kasteloj. Ankaŭ la reĝo vojaĝis.

Francisko la 1-a faras grandan vojaĝon tra Francio, kiu daŭras du jarojn! Li renkontas sian popolon kaj prezentas sian filon, la daŭfenon (kronprincon).



Kiam la reĝo ekrestadas en kastelo, la servistoj malŝarĝas la kofrojn: ili eligas la vestaĵojn kaj la teleraron. Ili malvolvas la tapiŝojn kaj fiksas ilin al la muroj.

LA VIVO DUM RENESANCO

La korteganoj aprezis rafinitajn vestaĵojn kaj manĝojn.
Ili ŝatis legadon, poezion kaj muzikon.

En la kasteloj oni servas histrikan pasteĉon kaj melonon el Italio. Ĉiu prenas la manĝaĵon per siaj fingroj kaj metas ĝin sur pantranĉon, kiu utilas kiel telero. Kuleroj kaj forketoj ankoraŭ ne ekzistas. La invititoj alportas siajn proprajn tranĉilojn.

La senjoroj kaj iliaj edzinoj surhavas altvalorajn vestaĵojn.

La riĉuloj timas rabistojn, kiuj gvatas malfrue vespere.

LEONARDO DE VINĈI

Francisko la 1-a petis tiun grandan italan artiston ekloĝi en Francio. Leonardo sciis ĉion fari: pentri, arkitekti, inventi...

Leonardo de Vinĉi pentris tiun ĉi pentraĵon en Italio. Francisko la 1-a aĉetis ĝin post la morto de la pentristo. Laŭdire estas portreto de itala damo, Mona Lisa, kun la kromnomo “la Ĝokonda”, ĉar ŝia edzo nomiĝis Francisko de Ĝokondo.



Leonardo Vinĉi elpensis multajn inventaĵojn: paraŝuton, savoveŝton, flugmaŝinon... Li ne realigis ilin. Li postlasis siajn skribaĵojn kaj desegnaĵojn, ekzemple tiun ĉi de homo al kiu oni alfiksis flugilojn.

LA SAMURAJOJ

Tiuj japanaj kavaliroj servis militestron nomatan “ŝoguno”.
Iliaj filoj sekvis la kursojn de majstro en armila lernejo.



La blazono de ĉiu klano estas desegnita sur la standardoj.

Sola en la naturo, tiu ĉi juna samurajo lernas supervivi.

La junuloj lernas manipuli sabron, arkon aŭ bastonon.

La riĉaj militistoj surhavas belege dekoritajn kirasojn.

La riĉaj samurajoj posedis sian propran armeon kaj vastajn bienojn, sur kiuj la kamparanoj rikoltis rizon.

La plej potencaj samurajoj, la daimioj, konstruigas grandajn kastelojn. La soldatoj instalas siajn domojn ĝuste apude.



Kelkfoje la daimioj militas unu kontraŭ la alia. Kamparanoj kaj artistoj kun siaj familioj tiam rifuĝas en la kastelo.



DE HENRIKO LA 4-A ĜIS LA FRANCA REVOLUCIO (1589 - 1789)

LA BONA REĜO HENRIKO LA 4-A

Francio estis ruinigita de militoj. Henriko la 4-a revenigis pacon kaj malpliigis la impostojn. Li subtenis agrokulturon kaj komercon.

Henriko la 4-a amas siajn infanojn... kaj sian popolon. Li deziras, ke ĉiu havu sufiĉe de mono por povi manĝi bolitan kokinaĵon ĉiun dimanĉon.



Henriko la 4-a venis el familio de protestanta religio. Por fariĝi reĝo de Francio li konvertiĝis al la katolika religio kaj ĉesigis la religiajn militojn. Li estis murdita de Ravajako.

JE LA TEMPO DE LA MUSKETEROJ

La musketero havis bluan tunikon dekoritan per blanka kruco. Lian ĉapelon ornamis plumtufo. Li ĉiam portis sian glavon.





Kiam li militas, la musketero uzas fusilon nomatan “muskedo”. Li instalas ĝin sur forkostango antaŭ ekbruligi la meĉon.

La musketeroj anas en la armeo de la reĝo Ludoviko la 13-a. Ili tasko estas protekti la reĝon kaj konservi la ordon en Parizo.

LA REĜO LUDOVIKO LA 14-A EN VERSAJLO

Ludoviko la 14-a konstruigis palacegon ĉirkaŭitan de splendaj ĝardenoj. La nobeluloj de la regno deziregis vive tie apud la reĝo.

Ludoviko la 14-a laborigis la plej bonajn arkitektojn kaj ĝardenistojn. Jen la palaco tiel, kiel ĝi estis je lia morto. La konstruado daŭris 40 jarojn!

Dum mondumaj kunvenoj nur la reĝo konservas sian ĉapelon sur la kapo. La suvereno ŝatas akcepti siajn vizitantojn supre de granda ŝtuparo nomata “la ŝtuparo de la reĝo”.

LA TAGO DE LA REĜO LUDOVIKO LA 14-A

Ĉiun tagon la korteganoj amasiĝis por ĉeesti la ellitiĝon, la manĝojn kaj la enlitiĝon de la reĝo. Ĉio fariĝis spektaklo!

La ĉefa ĉambelano disigas la litkurtenojn kaj vekas la reĝon.



La barbiro razas la reĝon. Poste li proponas al li elekton da perukoj.

La vestotenisto prezentas vestaĵojn al la reĝo.

Poste la reĝo ĉeestas la meson, ĉirkaŭita de siaj korteganoj.

La regno de Ludoviko la 14-a estis la plej longa en la historio de Francio. Liaj genepoj mortis antaŭ li. Lia pranepo estis lia posteulo.

Post la tagmanĝo la reĝo foriras promenadi aŭ ĉasadi.



Poste la reĝo iras al sia oficejo kaj laboras kun siaj konsilistoj.

La reĝo vizitas la reĝinon kaj siajn infanojn en ilia apartamento.



Antaŭ la vespermanĝo la reĝo ludas bilardon kun la korteganoj.

GRANDAJ SPEKTAKLOJ

Ludoviko la 14-a ŝatis mirigi siajn invititojn organizante belajn festojn sur la Granda Kanalo kaj en la Galerio de Speguloj.

La korteganoj dancas menueton en la vastega Galerio de Speguloj. La altaj fenestroj frontas al muro garnita per speguloj.



La reĝo elpensas grandajn spektaklojn, kiuj distras la korteganojn. Li ŝatas ŝipveturi sur la Granda Kanalo akompanita de siaj invititoj. Orkestro ludas muzikon kaj lanternoj prilumas la kanalon. Granda piroteknikaĵo konkludas la vesperon.

LA TEATRO DE MOLIERO

Je la tempo de Ludoviko la 14-a la komediistoj estis malriĉaj. Ili petis permeson ludi sur la placoj de la vilaĝoj.

La trupo de Moliero revenis al Parizo. La reĝo ĉeestas iliajn spektaklojn kaj multe amuziĝas. Ili poste ludos en Versajlo.



Jen kelkaj personoj de la teatraĵoj de Moliero: la Imaga Malsanulo, la Ridinda Preciozulino, kaj Harpagono kiu volas konservi sian oron.

LA PIRATOJ

Tiuj maristoj atakis ŝipojn por ŝteli iliajn varojn.
Se ili estis kaptitaj, ili estis kondamnitaj al mortopuno!

Kiam ili alproksimiĝas al la ŝipo, la piratoj hisas sian flagon.



La estro de la piratoj ordonas al la malamika kapitano kapitulaci.

Konkerintaj la ŝipon, la piratoj dividas la trezoron.



La piratoj enterigas sian trezoron sekrete sur dezerta insulo.

LA KORSAROJ DE LA REĜO

Tiuj maristoj atakis ĉiun ŝipon malamikan al Francio. La reĝo permesis al ili tion fari, kondiĉe ke ili donu al li parton de sia predo.

La korsarŝipo bombardas la grandan hispanan ŝipon. La maristoj ne plu povas ĝin manovri kaj estos malliberigitaj.

La fama Duguay-Trouin estas kapitano en la Reĝa Floto.



La ŝipanaro pafas per la kanono kaj preparas la albordan atakon.

ALIVESTU VIN KIEL PIRATO!

Materialo: 1 rulaĵo de ruĝa krepa papero kaj 1 nigra - 1 nigra ŝminka krajono - 1 marista T-ĉemizo - 1 peco de ŝnuro sufiĉe longa por ĉirkaŭiri viajn talion kaj kapon.
Surmetu la T-ĉemizon. Metu la pantalonon, refaldu ĝin je la talio kaj zonu ĝin per la ŝnuro. Refaldu la krurumojn ĝis sub la genuoj.

A) Desegnu la falsajn cikatron kaj barbon per la ŝminka krajono.

B) Petu plenkreskulon desegni sur via brako tiun ĉi mortokapon, simbolon de la piratoj, per la ŝminka krajono.

C) La fulardo.



Eltranĉu rektangulon da ruĝa krepa papero laŭ la mezuro indikita. Faldu ĝin triangule.

Fiksu la fulardon sur via kapo kaj faru nodon.



D) Eltranĉu rektangulon da nigra krepa papero de 6 x 12 cm. Faldu ĝin duoble kaj eltranĉu rondon, atentante ne ĉion eltranĉi, kiel sur la modelo. Metu la ŝnuron kaj kungluu la du rondojn.

Jen ideala vestaro por ludi piratojn!

LUDOVIKO LA 14-A KAJ MARIA ANTONIA

Je la aĝo de dek kvar jaroj la aŭstra princino Maria Antonia alvenis en la franca kortego por edziniĝi al la estonta reĝo Ludoviko la 14-a.

Ludoviko la 14-a konstruigis la "vilaĝon de la reĝino" en la parko de la kastelo de Versajlo.



Jen la reĝino kun tri el ŝiaj infanoj. Dekstre Madame Royale, nomata "Muslino" de sia panjo. La bebo, kiun la panjo nomis "Amobrasiko", estos enkarcerigita kun siaj gepatroj kaj sia fratino. Lia morto restas mistero. Maldekstre la plej aĝa filo. Li mortos dum la Revolucio.

LA FALO DE LA BASTILO

Dum julio 1789 la kolero subbrulas en Parizo, kaj parto de la enloĝantaro de la ĉefurbo komencas tumulti.





La 14-an de julio la ribelo eksplodas. Por alfronti la soldatojn la ribeluloj disponas je armiloj, sed ne je pulvo.

Ili trovos tion en la kavoj de eksa prizono, transformita en frenezulejon, la Bastilo. La gardistoj malfermas la pordegojn.

La revoluciuloj surhavas trikoloran kokardon. La blanko estis la koloro de la reĝo; la blua kaj ruĝa estas la koloroj de Parizo.



La revoluciuloj eniras en la fuorton kaj mortigas la gardistojn. En la subteraj kavoj ili trovas pulvon por kanonoj.

La sekvan tagon la ribeluloj komencas malkonstrui la Bastilon, ŝtonon post ŝtono. De tiam la francoj festas la 14-an de julio ĉiun jaron.

LA REĜO REVENAS AL PARIZO!

La revoluciuloj poste iris al la kastelo de Versajlo.
Ili petas al la reĝo veni ekloĝi en Parizo.



La reĝo akceptas forlasi Versajlon kaj ekloĝi en la ĉefurbo.
Li loĝos kun sia familio en la palaco de Tulerio.



Ĉar la reĝo disdonigis farunon, oni kromnomas la reĝon, la reĝinon kaj la daŭfenon “la bakisto, la bakistino kaj la eta bakistoknabo”.

LA LASTAJ TAGOJ DE LA REĜO LUDOVIKO LA 16-A

La reĝo estis strikte gardata. Oni timis, ke li petos eksterlandajn princojn veni lin helpi per siaj armeoj.

La reĝo forfuĝis. Sed oni rekonis lin en Vareno [*Varennes*] kaj revenigas lin devige. La revoluciuloj sentas sin perfiditaj kaj ne plu fidas lin.



La reĝino timegis en Vareno. Oni rakontas, ke ŝiaj blondaj haroj tute blankiĝis! La reĝo estas akuzita ne akcepti la Revolucion. Li estas kondamnita al la mortopuno. Ankaŭ la reĝino estos senkapigita per la gilotino.



LA 19-A KAJ 20-A JARCENTOJ

NAPOLEONO BONAPARTO

Li naskiĝis en Korsiko. Malgraŭ sia malgranda alteco, li ĉiam montris sian kuraĝon. Post la Revolucio li fariĝis granda militestro.

Post kiam li iĝis generalo, Bonaparto gajnas multajn batalojn. Li prenas la povecon. Napoleono fariĝas imperiestro de la francoj. Li kronas sian edzinon, kiu fariĝas la imperiestrino Jozefino.

LA GRANDA ARMEO

Napoleono volis pligrandigi sian imperion. Li bezonis multajn soldatojn. Li dividas kun ili la kampadejon kaj kuraĝigas ilin.

La ĉaroj estas plenaj je nutraĵo kaj pajlo.



La infanterianoj iras piede kaj portas tornistron.



La pajlo utilas kiel lito por la soldatoj... kaj por la ĉevaloj!



La kanonoj estas metitaj sur ĉaretoj, kiujn tiras ĉevaloj.



Napoleono estas sekvata de siaj oficiroj kaj de sia gvardio.

LA INDIANOJ DE LA AMERIKAJ PRERIOJ

Antaŭ la alveno de la “blankuloj”, ili starigis siajn tendojn, aŭ tipiojn, proksime de la gregoj de bizonoj, kies migradojn ili sekvis.



La viroj foriras ĉasi. Ili mortigas bizonojn per sagoj kaj lancoj. Poste ili uzos la fusilojn de la blankuloj. Ekde la infanaĝo la knaboj lernas de sia patro pafi per arko kaj rajdi sur ĉevalo.



La bizonaj haŭtoj utilas por fari tipiojn, kanuojn kaj vestaĵojn. La viando estas manĝita tuj, aŭ sekigita por la vintro. La knabinoj lernas kuiri kaj prepari la haŭtojn imitante siajn patrinojn, la “skvaŭojn”.

LA KONKERO DE LA OKCIDENTO

La blankuloj volis la terojn por si mem. Ili uzis siajn fajroarmilojn por forpeli la indianojn de iliaj teritorioj.



La pioniroj vojaĝas en ĉaroj, kiujn tiras virbovoj. Ili transportas sian tutan havaĵon: ilojn, meblojn kaj manĝaĵon. Ili iras al la okcidento, kie ili esperas trovi bonan kultiveblan teron.



La blankuloj mortigas la bizonojn. La indianoj luktas por konservi siajn terojn kaj nutraĵon. Baldaŭ, venkitaj de la milito kaj malsanoj, ili vivos enprizonigitaj en rezervejoj instalitaj sur malfekundaj teroj.

LA MODERNAJ OLIMPIAJ LUDOJ

En 1896 la Ludoj okazas en Ateno. La stadiono similas al tiu de Olimpio, la urbo kie estis organizitaj la Ludoj de la antikva Grekio.





Pierre de Coubertin havas la ideon organizi la Olimpiajn Ludojn. La kvin interplektitaj ringoj reprezentas la kvin kontinentojn.

La plej bonaj atletoj de malsamaj landoj konkuras unu kontraŭ la aliaj konservante sportistan sintenon: la esenco estas partopreni. La torĉo alvenas de la urbo Olimpio. Ĝi utilas por ekbruligi la vaskon, kie la flamo brulos dum la daŭro de la Ludoj.

EN VILAĜO ANTAŬ 100 JAROJ

La komunuma lernejo estis kreita antaŭ nelonge. Dum iliaj infanoj aŭskultis la instruiston, la vilaĝanoj atendis la kolportiston.

La kolportisto paŝis longe antaŭ alveni en la vilaĝo. En sia dorsokorbo li portas ludkartojn, okulvitrojn, leterpaperon... sed antaŭ ĉio ilustritajn librojn. Kelkaj vilaĝanoj ne scipovas legi. Ili preferas librojn, kiuj enhavas belajn bildojn.



Jen la lernejo de la knaboj. La instruisto kaj la lernantoj surhavas grizan bluzon.



Vespere la infanoj helpas siajn gepatrojn labori en la farmo.

Dum tiu epoko la gepatroj ofte havis almenaŭ kvin infanojn.
Ili kelkfoje loĝis en la sama domo kiel la geavoj.

La panjo boligas la tolaĵon en lesivujo kaj rinsas ĝin en granda ligna kuvo. La avino senplumigas anseron antaŭ kuiri ĝin.

La infanoj alportas lakton de la farmo.

La avo fendas brul-lignon por la vintro.

La avino trikas puloverojn kaj skarpojn.

EN LA URBO

Ĉiun semajnon la kamparanoj vendis siajn produktojn en la bazaro de la urbo. La urbanoj ekkutimis vojaĝi en trajno.



Kamparanino alportas siajn tranĉilojn al la akrigisto: li akrigas ilin por ke ili pli bone tranĉu. Kamparano transportas vendendajn kokinojn.



Antaŭ nelonge konstruiĝis stacidomo. La vojaĝantoj eliras el vagonoj, kiujn tiras unu el la unuaj vaporlokomotivoj.

JUNA MINISTO

Multaj infanoj forlasis la lernejon tre frue, kiel tiu ĉi juna knabo, kiu laboris en mino.



La ministoj malsupreniras ĝis la fundo de la mino ĉiun tagon.



En la galerio la ĉevalo tiras vagoneton plenan je karbo.

La junaj ministoj portas la lampojn, zorgas pri la ĉevaloj, aŭ iras trovi karbon en mallarĝaj lokoj.

LA EJFELTURO

En 1889 la “fera damo” estis la plej alta monumento en la mondo. Ĝi portas la nomon de sia konstruinto, la inĝeniero Gustavo Ejfelo.



La pilieroj estas starigitaj sur solidega fundamento. La laboristoj faras veran puzlon per la fertraboj.



La finita Ejfelturo havas tri etaĝojn.



La fertraboj estas fabrikitaj, kunigitaj kaj ŝarĝitaj sur ĉaretoj. Ĉevaloj tiras ilin ĝis la konstruejo.

La vizitantoj supreniras per ŝtuparo aŭ lifto.

LA UNUA MONDMILITO 1914-1918

Dum kvar longaj jaroj Francio, Rusio kaj Britio batalis kontraŭ Germanio kaj Aŭstrio-Hungario.



Estas “tranĉea milito”: la soldatoj faras fosaĵojn en kiuj ili sin protektas kontraŭ la pafado de la malamikoj.

Post kiam tiu ĉi soldato estis vundita dum batalo, oni lin reportas al la tranĉeo kaj poste kondukas al lazareto, kie li estas flegita.

La junaj viroj foriris militi. La virinoj ilin anstataŭas: ili laboras en la uzinoj kaj kondukas la busojn kaj metroojn.

En 1917 Usono siavice deklaris militon kontraŭ Germanio. Ĝiaj soldatoj alvenis en Francio. Tio estis la fino de la “Granda Milito”.





La virinoj sendas leterojn al la soldatoj por ilin konsoli.
Ili kunsendas kovrilojn kaj nutraĵon.



La soldatoj havas forpermesojn por vidi sian familion.
Emeritaj instruistoj anstataŭas la pli junajn, kiuj foriris militi.

La 11-an de novembro 1918 la reprezentantoj de la venkita Germanio subskribas la armisticon en trajnvagono, kiu servas kiel komanda oficejo de la franca marŝalo Foch.

LA UNUAJ PILOTOJ “POŜTISTOJ”

Tiu pilotoj eksmilitistoj transportis poŝtaĵon al Afriko aŭ Ameriko. Ili navigis laŭ la vido de la pejzaĝoj.

La poŝtaĵo estas ŝarĝita en la dupersonan aviadilon Bréguet.

La pilotoj estas ŝirmataj kontraŭ nek la pluvo, nek la suno.



La fuzelaĝo de la aviadilo estas el ŝtalo kaj ĝia helico el ligno.



La pilotoj timas, ke la aviadilo kraŝas meze de la dezerto.

LA UNUAJ PAGITAJ FERIOJ

Dum la somero 1936 la francaj laboristoj havis por la unua fojo ferion kun salajro. Ili povis foriri kun sia familio!



La laboristoj ne posedas aŭton. Kelkaj alkroĉas remorkon al sia biciklo aŭ tandemo. Aliaj uzas la trajnon: ili rajtas aĉeti bileton malpli kostan por foriri ferii.

Infanoj kaj gepatroj ofte malkovras la maron por la unua fojo, do ili ne scipovas naĝi. Okazas la unuaj ferikolonioj. La infanoj profitas de la freŝa aero, eĉ se iliaj familioj devas resti en la urbo.

LA DUA MONDMILITO 1939-1945

Hitlero regis Germanion. Kiam li komandis sian armeon invadi Pollandon, la francoj kaj britoj deklaris militon kontraŭ li.

Hitlero volas domini la mondon. Lin protektas lia gvardio, la SS, kiu ĵuras al li fidelecon. Li starigas potencan armeon, ekipitan per aviadiloj kaj atakĉaroj. La nigra hokokruco, aŭ svastiko, kiu ornamas la flagojn, estas la simbolo de liaj amikoj de la nazia partio.

Tiu ĉi brita aviadilo de la komenco de la milito bombardas germanan ŝipon.



La rusoj, la japanoj kaj la usonanoj eniras la militon.

LA REZISTADO

La franca registaro estis estrata de la marŝalo Pétain.
Sed homoj organizis rezistadon: ili volis forpeli la germanojn.





La amikoj de la rezistantoj aŭskultas la britan radion. Kelkfoje ili aŭdas la voĉon de la generalo de Gaulle, kiu parolas el Londono.

Rezistantoj elreligas trajnon, kiu transportas germanojn.
Ili riskas kaptiĝi de la germana polico, la Gestapo.

LA VIVO DUM LA GERMANA OKUPACIO

La vivo malfacilas por la plejparto de la eŭropanoj. Mankas karbo por hejtado. Oni bezonas porciumajn biletojn por aĉeti panon.

Tiu ĉi sinjorino povas aĉeti nur la varojn menciitajn sur la bileto.

La infano dormas kun ŝtrumpoj kaj ĉapo por ne frosti.

Aviadiloj faligis bombojn: la urbo estas detruita.

La judoj surhavas flavan stelon. Hitlero volas ilin ekstermi.

6-A DE JUNIO 1944: LA ELŜIPIĜO

La germanoj timis elŝipiĝon. Por sin protekti ili konstruis fortikaĵojn, nomatajn blokhaŭsoj, laŭlonge de la marbordoj.



Dum la “T-tago” la Aliancanoj elŝipiĝas sur la normandiaj plaĝoj. Sub la pafado de la germanoj, miloj da homoj atingas la marbordon.



La paraŝutistoj saltas el la aviadiloj. Iom post iom la aliancitaj armeoj sukcesas forpeli la germanojn. Estas la Liberiĝo!

LA MONDO POST LA MILITO

La orienteŭropaj landoj pasas sub la dominado de Sovetunio.
La okcidenteŭropaj landoj akceptas la helpon de Usono.



Berlino estas bombardita kaj Germanio venkita. La estroj de Britio, Usono kaj Sovetunio kuniĝas por organizi la finon de tiu mondmilito.



La germana ĉefurbo Berlino estas dividita en du partojn. La enloĝantoj fuĝas la orientajn kvartalojn, kontrolitajn de la rusoj, por atingi la okcidentajn kvartalojn, kie ili esperas pli bone vivi. Tial la rusoj konstruas grandegan muron, gardatan de soldatoj.

LA POSTMILITAJ JAROJ

Iom post iom elektro estas instalita en la domoj. La familioj malkovras la fridujon, la lavmaŝinon... kaj la televidilon.

1

2

1 - Kun la lavmaŝino oni ne plu bezonas frotadi por formeti la makulojn.

2 - La junuloj surhavas ĝinzojn. Tiuj iĝis modaj!

3

4

3 - La patrino ne plu preparas konservaĵojn: ŝi aĉetas ilin.

4 - La kantisto ludas rokenrolan arion sur sia gitaro.

5

6

5 - Tiu ĉi infano spektas televidan elsendon sur nigra-blanka ekrano.

6 - Tiu ĉi junulino aŭskultas 33-turniĝan diskon sur sia elektrofono (pragramofono).

ŜANĜIĜOJ DE LA PEJZAĜO

La homoj inventis novajn manierojn loĝi, vojaĝi kaj labori.
Ili konstruis aŭtoŝoseojn kaj grandurbojn.



Multaj homoj aĉetas sian unuan aŭton. Tial oni bezonas konstrui aŭtoŝoseojn por faciligi la transportadon.

Pli kaj pli da kamparanoj forlasas la kamparon por labori en uzinoj proksimaj de la grandurboj. Ili ekloĝas en antaŭurboj. Nubskrapuloj konstruiĝas apud la dometoj.

LA KONKERO DE LA KOSMO

Pli kaj pli gigantaj raketoj transportis satelitojn, robotojn kaj kelkfoje eĉ homojn en la kosmon!



La usonano Neil Armstrong estas la unua homo, kiu paŝas sur la Luno. Tio okazis la 21-an de julio 1969.



La eŭropa raketo Ariane ekflugas el Franca Gujano. Ĝi metos satelitojn en orbiton.



La satelitoj ebligas dissendi televidajn programojn kaj observi la Teron.



La navedŝipo ligiĝas al la spacstacio Mir. Nova skipo da kosmonaŭtoj ekdeĵoras.

VOLO KONSTRUI EŬROPON!

La eŭropaj landoj decidis ne plu militi unu kontraŭ la alia.
Sed Germanio restadis dividita en du, samkiel ĝia ĉefurbo Berlino.

Ses landoj fondas la "Eŭropan Ekonomian Komunumon": Nederlando, Belgio, Germanio, Luksemburgio, Francio kaj Italio. Fariĝas tre facile vojaĝi kaj komerci inter tiuj malsamaj landoj. La kamionoj ne plu atendas horojn ĉe la landlimoj!

Dudek ok jarojn post la konstruo de la berlina muro, la du Germanioj repaciĝas kaj la muro estas finfine malkonstruita. Estas festo en la urbo. Berlino refariĝas la ĉefurbo de unuiĝinta Germanio.

NOVA MONUNUO, LA EŬRO!

En sia monujo francoj havis frankojn, italoj lirojn, germanoj markojn... Kaj nun ĉiuj havas eŭrojn.

Kiam ni vojaĝas en la landoj, kiuj adoptis la novan monunuon, ni uzas la samajn monerojn kaj la samajn monbiletojn. Antaŭe oni bezonis monŝanĝojn kaj multajn kalkulojn!



Sur tiu ĉi bileto la vorto “eŭro” estas skribita per la latina kaj greka alfabetoj. La flago kun dek du steloj simboligas Eŭropon. La mapo de Eŭropo estas desegnita sur la alia flanko de la bileto. Sur la dorsflanko de la moneroj ĉiu lando elektis desegnaĵon, kiu ĝin reprezentas.

KONTROLU VIAJN SCIOJN

Bone rigardu tiujn ĉi bildojn, kiujn vi vidis en via bildlibro, kaj provu respondi al la demandoj.



Ĉu tiu ĉi muro estis konstruita en Usono aŭ en Ĉinio?



Ĉu tiuj ĉi militistoj estas romianoj aŭ vikingoj?

Al kiu apartenas tiu ĉi flago? Ĉu al piratoj aŭ al vakeroj?



Kiu estas? Ĉu Johanino de Arko aŭ Maria Antonia?



Ĉu tiu ĉi stiranto de ĉaro estas romiano aŭ gaŭlo?



Ĉu Tutankamon fariĝis faraono tre juna aŭ tre maljuna?



Ĉu Ludoviko la 14-a konstruigis katedralon aŭ grandan kastelon?



Ĉu la Bastilo estis palaco aŭ prizono?

Respondoj: *A. En Ĉinio - B. Vikingoj - C. Piratoj - D. Maria Antonia - E. Tre juna - F. Gaŭlo - G. Grandan kastelon - H. Prizono.*

La bildlibro de la historio

Observante la precizajn kaj humurplenajn ilustraĵojn de tiu ĉi bildlibro, la juna infano konatiĝos kun gravaj personoj kiaj faraonoj, imperiestroj kaj esplorvojaĝantoj. Ĝi ekkomprenos la kronologion tra la konciza prezento de la grandaj historiaj epokoj kaj la plej epokfaraj okazintaĵoj. Ĝi vojaĝos en la tempo, malkovrante la ĉiutagan vivon de la fino de la prahistorio ĝis la nuntempo.

...

ISBN : 978-2 215-06225-7

11,50 €